# Muziko, kursoj, ekskursoj...
# kaj vere internacia etoso

Al la Itala-Europa Kongreso en Linjano Orsabla (21-28a de auguto 2010)
alighis ghis nun 138 esperantistoj el 20 malsamaj landoj...
64 italoj, 23 poloj, 9 rusoj, 6 armenoj, 6 francoj, 6 germanoj...

Chijare ankau estos en la programo

## Rapida kurso de la itala lingvo

gvidata de prof. Davide Astori (Universitato de Parma), krom la seminarioj, la kursoj, la prelegoj, kaj chiutage

## ekskursoj al la plej gravaj vidindajhoj de la veneta regiono.

Kaj estas nun kompleta la listo de artistoj, kiuj dum la kongreso prezentos sian koncerton.
**Sabato la 21an de augusto - JoMo**
**Dimancho la 22an de augusto - Irena Urbanska**
**Lundo la 23an de augusto - Mikaelo Broshtejn**
**Mardo la 24an de augusto - Jhomart kaj Natasha kun Carina**
**Merkredo la 25an de augusto - Amir kaj EspoDespo**
**Jhaudo la 26an de augusto - Georgo Handzlik**

La lastan vesperon, kiel tradicie en la internaciaj kongresoj, chiuj plej lertaj kongresanoj prezentos sian malgrandan spektaklon.

**Vendredo la 27an de augusto - Internacia vespero**

Se vi mem havas kanton, dancon au alian artajhon por prezenti, jam nun proponu vian kontribuon, tiel ke ni povu plani belan, harmonian kaj kvalitan vesperon.

Chiuj koncertoj estos publikaj, do povos ilin rigardi ankau la loka publiko kaj la aliaj neesperantistoj, kiuj chijare ferios en

## Linjano Orsabla

Se vi ankorau ne alighis, bonvolu tuj nun iri al la pagharo

**http://italakongreso.esperantoitalia.it**

kaj klikante sur la ligo **Alighilo** enskribu vian nomon.

**Ni chiuj atendas vin che la adriatika maro...**

Itala Esperanto-Federacio - Federazione Esperantista Italiana
Konstanta Kongresa Respondeculo - Responsabile Congressi

77a Itala Kongreso de Esperanto - Linjano Orsabla 2010.08.21-28
77° Congresso Italiano di Esperanto - Lignano Sabbiadoro 21-28 agosto 2010

**http:/italakongreso.esperantoitalia.it**
esperanto@edistudio.it
Bruchjo Kasini - Brunetto Casini - tel. 050 982955, +39 329 7463600, +48 694 681873